**N I A V O Ĉ O**

## Madrida Esperanto-Liceo

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JULIO-AŬGUSTO 2002**

**ESPERANTA ENCIKLOPEDIO**

Por movado ĝenerale kaj por instruistoj speciale gravas la nove kreskanta reta enciklopedio Vikipedio *(http://www.eo.wikipedia.com)* kien devus kontribui ĉefe instruistoj kaj utiligi ĝin ankaŭ por instruado kaj motivigo de lernantoj. Posedi en la reto Esperantlingvan informejon pri ĉiuj imageblaj temoj gravas por utiligo de la internacia lingvo, sekve ankaŭ kiel pruvo pri ĝia utileco. Ekde novembro 2002 aperis pli ol du mil artikoloj, kiujn eblas utiligi ankaŭ dum instruado.

**KONGRESO DE VALENCIA ESPERANTO-FEDERACIO KAJ MURCIO**

Dum majo, okazis la kongreso en Vall d'Uxó (Castellón), kun ĉeesto de kvardeko da samideanoj. En la Ĝenerala Kunveno, la ĝisnuna Prezidanto Augusto Casquero transdonis la prezidantecon al José Miguel Bernabeu (Alicante). La rusa samideano Sergej Maltsev prelegis pri la temo "Esperanto dum la bolĉevisma tempo en Sovetunio, kaj Augusto Casquero prelegis pri "Pilgrimado al Santiago de Compostelo". La kongresanoj havis la eblecon, laŭ invito de la Urba Registaro, viziti la belegan groton "Sankta Jozefo", vizitebla per boato, ĉar tra ĝi fluas subtera rivero. La kongreso finiĝis per gustumado de granda "paella" preparita de niaj kasteljonaj gesamideanoj Paco Conejero kaj Inés Comabella. Poste ĉiuj adiaŭis ĝis la sekvonta jaro 2003, por la 14 a kongreso, kiu okazos en Murcio.

**61A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO** 1-4 de aŭgusto

KONGRESEJO: Colegio Mayor Universitario de Alicante. Campus de la Universidad s/n. San Vicente del Raspeig (Alicante). La Kolegio okupas areon de 20.000 kvadratajn metrojn kun loĝejoj, sportejoj, ĝardenitaj zonoj kaj parkejo. Inter la diversaj servoj oni povas mencii la grandan manĝejon, kafejon, grandan salonon por 350 personoj, basenon, ktp. Ĝi estas tre bone ligita kun la urbocentro per oftaj urbaj trafikiloj. *www.esperanto-es.net/kongreso/2002* PREZOJ: Kongreskotizo: Membroj de HEF 25 eŭroj. Ne membroj 29 eŭroj.

LOĜADO: En la kongresejo, unulita ĉambro + matenmanĝo: 24 eŭroj. Ĉar la kvanto da ĉambroj estas limigitaj en la Universitata Hotelo (30) nur oni donos ilin laŭ la datoj de la mendoj

ALIAJ LOĜEJOJ. Oni rezervos laŭ la eblecoj, ĉar en Alicante malfacilas rezervi por la somero malfrue. Se necese, la organizantoj rajtas serĉi alternativajn loĝejojn, kun similaj prezoj

TUTTAGA KONGRESA EKSKURSO. Vizito al la kavernoj de Canalobre kie dum la hispana revolucio estis ateliero por muntado de aviadilaj motoroj, al vilaĝo Guadalest agnoskita kiel historia kaj arta ensemblo, kaj fine al urbeto Benidorm kiu estas la unua plej grava turisma loko en la mediteranea marbordo. Manĝado en restoracio. Prezo 36 eŭroj.

DUONTAGA KONGRESA EKSKURSO. Dum tiu ĉi ekskurso al urbeto Elche ni povos viziti la plej grandan palmejon en Eŭropo kaj aliajn verdajn spacojn kiel la Komunuma Parko kaj la Ĝardeno de la Pastro. Prezo 10 eŭroj.

POSTKONGRESA EKSKURSO: Se estas sufiĉe da kandidatoj, okazos postkongresa ekskurso al Valencio. Tuttaga ekskurso al urbo Valencio. Vizito de la urbo, historia urbocentro, Palaco de la Artoj kaj la Sciencoj, Albufera. Tagmanĝo en restoracio, prezo 36 eŭroj. Por tiuj kiuj deziras resti en Valencia poste, eblas rezervi ĉambrojn en pensiono, ĉe la urbocentro, se oni rezervas frue.

ANTAŬKONGRESO Se estas sufiĉe da interesiĝantoj, oni povas organizi kelktagan turisman restadon en Valencio, laŭ la samaj prezoj.
Konstanta adreso: Augusto Casquero de la Cruz. Avenida Burjasot, 29, A-31. 46009 Valencia.
E-Mail: *augustocasquero@infonegocio.com*
Bankkonto: BANCAJA Strato Málaga 37 46009 Valencia Konto: 2077 0069 24 3100702329
Ne oni traktos hotelmendon sen antaŭa pago. Kotizoj ne estas repageblaj.

**NIA VOĈO JULIO -AŬGUSTO 2002**

**MADRIDAJ URBODOMAJ REKONOJ**

Madrida Esperanto-Liceo sendis apog-leteron al diversaj membroj de la Urbestraro kiel apogo al la leteroj sendita de HEF, petantaj honori la memoron de eminentaj esperantistoj per nomigo de stratoj aŭ fiksi mur-memor-tabulon, tkp.:

Apogo al la rekono de la "Grupo Municipal Socialista", kiu proponas honori la memoron de Cayetano Redondo, urbestro de Madrido (1936-1937).

Propono por rekono al al memoro de la kolonelo Julio Mangada Rosenörn, "Medalla de Oro de Madrid" en 1936, kaj al generalo Emilio Herrera Linares, pioniro de la hispana aviado, fondinto de la "Escuela Superior de Aeronaútica" kaj ministro de la ekziliita Hispana Respubliko.

**TABULO DE MANGADA** *(Raportas Tonyo del Barrio)*

Nia samideano Santiago Torné, kun kiu mi kontaktis dank al Darío, sendis al mi foton de la tabulo per kiu la samideanoj madridaj omaĝis nian samideanon Julio Mangada en oktobro de 1936. La gravurita teksto diras: "Al Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio Generalo D. Julio Mangada Rosenörn. Tre kompetenta kaj nelacigebla batalanto de la Esperanto-Movado en Hispanujo. Rekoninte liajn meritojn dediĉas tiun ĉi dankecan pruvon la madridaj samideanoj. Madrid. Oktobro de 1936." Tamen, mi ankoraŭ ne trovis la lokon kien oni ĝin metis. Mi tamen trovis la akton per kiu oni donis al li la Oran Medalon de la urbo de Madrido. Tio estis en la urbestrara kunveno de la 21a de aŭgusto de 1936. Mi kopias parton de la teksto: *"Libro de actas del Ayuntamiento de Madrid, sesión ordinaria de veintiuno de agosto de mil novecientos treinta y seis. Presidencia del Excmo. Sr. Alcalde Don Pedro Rico López. [Tras aprobación del acta de la sesión anterior] El señor presidente dijo que con toda parquedad en la palabra iba a proponer al Ayuntamiento el otorgamiento de un distintivo, el mayor que el pueblo de Madrid, y en su nombre el Ayuntamiento, podía otorgar. Todos sabían, porque vivían estas horas angustiosas. lo sucedido en Madrid. Simbolizaba hoy el movimiento popular de defensa de la República, y, concresamente, de defensa de Madrid, la actuación del coronel, designado general por el pueblo, y amigo de sus señorías, don Julio Mangada, a quien su excelencia proponía se otorgara la Medalla de Oro. [Tras indicar que otros también lo merecían] ...y lo hacía en la persona del señor Mangada, por entender que éste simbolizaba en el día de hoy no sólo el elemento defensivo de Madrid, sino algo así como la leyenda popular de esa defensa de Madrid; era el héroe popular a quien todos admiraban, querían y seguían. Y el excelentísimo Ayuntamiento acordó por unanimidad de conformidad con la propuesta de su excelencia."* Tiu Ora Medalo povas esti tre bona okazo por rememorigi la urbestraron pri liaj meritoj, okaze de lia 125-jara datreveno.

P.S. : Notu ke oni nomas lin generalo, kaj en la tabulo kaj en la akto kaj en multaj aliaj lokoj. Tamen, li neniam estis generalo oficiale. Lia "Kolono" alnomis lin tia, sed lin oni igis nur kolonelo. Vi povas vidi foton de Mangada en *www.terra.es/personal/chechinet/6.htm*

**ESPERANTO EN ALTERNATIVA FOIRO**

En majo 2002, lokaj esperantistoj de "Esperanto-Fondaĵo Fernando Soler" muntis budon ĉe la Alternativa Foiro de Valencia (Hispanio). La budo estis vizitata de amaso da interesiĝantoj, kie tie havis la eblecon konatiĝi kun Esperanto, kaj eĉ renovigi kaj aktualigi siajn informojn pri nia lingvo, ĉefe rigardante kaj aĉetante librojn. La plej ŝatata informo estis tiu rilate E-on en la reto.